Aharon COHEN

# paco en proksima oriento

tradukis
Henri MASSON
el
"Kajeroj de la Jud-Araba Amikeco"

Suplemento
de
La Juna Penso - F 47340 Laroque Timbaut
Aùg. 1974 - N-ro 99 A

Antaŭparolo

# PACO
# EN
# PROKSIMA ORIENTO

de Aharon COHEN

La Jud-Araba Amikeco kunigis en tiu ĉi broŝuro kvar antaŭdirajn artikolojn verkitajn de Aharon Cohen, fondinto kaj membro de la kibuco Shaar Ha'amakim antaŭ kaj post la Sestaga Milito.

La aŭtoro, kiu sin dediĉas de tridek jaroj al la lukto por la komprenemo kaj la paco inter Judoj kaj Araboj, kaj tute aparte inter Israelanoj kaj Palestinanoj, montras en ĝi malofta akravidecon. Kontraste, oni povas bedaŭri la nekomprenemon de la nunaj israelaj regantoj, kaj incidente, la nerealismon de la palestinaj proparolantoj.

Oni legos sinsekve:

<u>La lukto por la paco</u>:

Paroladeto eldirita dum la "Seminario memore al Martin Buber" okazinta en Givat Haviva en septembro 1966 kaj publikigita en decembro 1966 de "New Outlook".

<u>La arabaj rifuĝintoj</u>. <u>Fundamenta problemo por Israelo</u> :

Interveno dum la sama seminario, publikigita en februaro 1967 de "New Outlook".

<u>Paco ne povas esti trudata</u>. <u>Ĝi naskiĝos nur el reciproka komprenemo</u>:

Artikolo verkita la morgaŭon de la Sestaga Milito por "Jewish Quarterly", en Londono kaj publikigita de tiu gazeto en aŭtuno 1967.

<u>La alternativo</u>:

Eltiraĵoj el artikolo publikigita hebrealingve en la ĵurnalo "Al Hamichmar", jidlingve en "Naye Press" kaj

anglalingve en "New Outlook", printempe de 1973.
Malgraŭ la forpasinta tempo, tiuj artikoloj restas, ve, ĉiam aktualaj.

La ĝenerala Sekretario,
Charles Jacobson.

Amikeco Jud-Araba ,B.P. 124-08 75008 PARIS

---

Biografio de Aharon COHEN

---

Aharon Cohen, naskiĝinta en 1910 en Besarabio, vivas en Israelo ekde 1929. Membro de la movado Hachomer Hatzaïr jam de sia frua junaĝo kaj membro de ĝia monda direkcio dum pluraj jaroj, li estas unu el la fondintoj de la Kibuco Shaar Ha'amakim, kies membro li daŭre estas. Li estis direktoro de la Departemento pri Arabaj Aferoj de la Partio Mapam kaj sekretario de la "Ligo por jud-araba proksimiĝo kaj kooperado".

Scipovante plurajn arabajn dialektojn, li dediĉis sin de pli ol tridek jaroj al la studado de la proksim-orientaj problemoj, pri kio li estas unu el la plej bonaj nuntempaj spertuloj.

Liaj ĉefaj verkoj estas:

- "L'Orient arabe" (1955) (La araba Oriento)
- "Le monde arabe aujourd'hui" (1958) (La hodiaŭa araba mondo)
- "Changements politiques dans le monde arabe" (1959) (Politikaj ŝanĝiĝoj en la araba mondo)
- "Nos voisins arabes" (1969) (Niaj arabaj najbaroj)

Liaj libroj estis publikigitaj en la hebrea en Israelo kaj en la angla en Londono kaj Nov-Jorko. Nuntempe, li finfinas grandan volumon titolitan:
"Les Kurdes, le pays, le peuple et leur mouvement de libération" (La Kurdoj, la lando, la popolo kaj ilia liberiga movado).

--==o==--

# Lukto por la paco

Oni diras, ke ni estas ĉiam ĉe la stadio de la monologo, kiu antaŭas la dialogon. Eble. Bedaŭrinde, tiu monologo estas ne multe kontentiga, ĉar ĝi estus valora nur laŭ la mezuro en kiu ĝi kontribuus prepari la vojon al vera dialogo inter Judoj kaj Araboj.

Profesoro Robert Misrahi prave diris, kiel disĉiplo de forpasinta Martin Buber, ke ĉiu vera dialogo postulas ian egalecon "Mi-Vi", en kiu neniu povas superi pro iu avantaĝo ellasebla. Kaj, tamen, eĉ en ĉi tiu nuna seminario, pluraj oratoroj ree uzas la sloganon laŭ kiu ni, Judoj, estas ĉiuj por la paco, dum la Araboj estas ĉiuj por la milito.

Nu, estas neekzakte, ke ĉiuj Judoj agas favore al paco kaj tutkore sopiras al ĝi, same kiel estas malvere,ke ĉe la alia flanko de la limo, ĉiuj volas la militon.

Antaŭ nelonge, mi interparoladis kun delegacio de usonaj studentoj venintaj esplori la jud-arabajn rilatojn. Du el ĝiaj membroj estis jam vizitintaj plurajn arabajn landojn; el ĉi tiuj Egiption,kie oni deklaris al ili, ke Israelo ne volas pacon, rifuzas sennukleigi tiun regionon, respondecas pri la konkuro al armado, kiu devigas la arabajn landojn malŝpari siajn vivrimedojn por militpreparado, anstataŭ uzi ilin por la disvolvado; ke la sinteno de Israelo kontraŭ la israelaj Araboj (Militista Administracio, diversaj formoj de diskriminacio) neniel signas sinceran deziron de kunlaboro; ke Israelo malamikece reagas al la sopiroj arabaj kaj ĉiam sin trovas ĉe la flanko de la malamikoj de la Araboj. Tiel okazis dum la evakuado de la Suezkanalo far la Britoj, aŭ dum la naciigo de tiu kanalo, kaj same dum la milito por la alĝeria sendependo, aŭ dum la iraka revolucio de julio 1958, aŭ dum la interna lukto en Libanio je la sama epoko, ktp.

Ĉiufoje, kiam la demando pri araba unueco estas en la tagordo, Israelo adoptas negativan sintenon, ĉiam en opozicio kontraŭ la araba nacia movado. Ni do rigardu

ambaù flankojn de la medalo, ne nur tiun, kiu estas videbla de la plimulto de la Judoj, sed tiun, kiun vidas la Araboj.

Ni konsentu, ke la paco, vivnecesaĵo por ambaù popoloj, ne venos per si mem, kaj en neniu kazo, se ni ne strebos tiucele, kaj se ni ne malembarasos la vojon, ĉiu sur sia tereno.

La decidigaj kriterioj de la lukto por la paco estas almenaù tri:

a)Tiu lukto estas ne nur grava demando, sed la plej grava el ĉiuj.

Unue, kvankam tio ne estas la plej grava aspekto, estas la graveco de la buĝeto dediĉita al armiloj. "Al Marsad" raportas deklaron de David Ben Gourion al deputitoj Abdul Aziz Zu'abi kaj Ibrahim Shbat, laù kiu militaviadilo, kiu antaùe kostis 30 000 dolarojn, nuntempe kostas duonmilionon da dolaroj, kaj ĉiun kvaran aù kvinan jaron ni devas renovigi nian eksmodiĝintan armilaron. Tamen,ne temas nur pri la ekonomia vidpunkto.

Se la nuntempa situacio daùros, la disvolvado de la militarismo kaj ŝovinismo, ambaùflanke, plilarĝigos senmanke la abismon, kiu apartigas niajn naciojn unu disde la alia.

b)Necesas kredi je la paco. Kiu ne kredas ebla la paco, tiu ne povas sukcese lukti por ĝia realigo. Ĉu tiuj,kiuj dubis pri cionismo povis esti inter ĝiaj realigantoj? Kiam oni ne kredas je paco - en antaùvidebla estonto kaj ne kun la alveno de Mesio - oni kreas, por sin pravigi, trompajn teoriojn, ŝajnigante ĝin deziri, oni omaĝas al ĝi malvolonte.

c)Necesas esti preta ĝin pagi per oferoj. Kiuj proklamas voli pacon sed rifuzas la prezon, tiuj montras tiele, ke ĝi estas por ili senvalora.

Eĉ se necesas ĝin pagi altpreze, je ambaù flankoj, ĝi kostos finfine malpli ol milito aù eĉ daùrigo de la nuna situacio sen milito, nek paco.

Se tiuj tri kondiĉoj ne estas plenumitaj, anstataù progresi al paco, oni iras en la kontraùa direkto. Ekde 1948 niaj popoloj foriĝas unu de la alia anstataù proksimiĝi. La murego pligrandiĝas inter ni laù alteco kaj larĝeco.

Timiga fenomeno: la instruado de la araba lingvo en niaj lernejoj estas neglektata; nenio estas farata, tute kontraŭe, por kuraĝigi la studadon de la araba mondo, por konigi ĝiajn historion, kulturon, menson, problemojn, sopirojn, malfacilaĵojn kaj luktojn. Nova generacio kreskas en Israelo, por kiu la araba mondo estas tiel nekomprenebla, kiel estas Israelo por la juna araba generacio, je la alia flanko de la murego.

La plimulto el la plenkreskuloj delektiĝas per la falsado de la gazetaro kaj radio, kiuj tro ofte konfuzas informadon kaj propagandon, certaj pri la absoluta justeco de sia kaŭzo. Oni zorge ekzamenas la malfacilaĵojn kaj malsukcesojn de la kontraŭulo, dum liaj realigoj, progresoj estas ignorataj aŭ minimumigataj. Oni ne emas kompreni tion, kio reale okazas ĉe la najbaro, kiaj estas liaj sopiroj, kiudirekte disvolviĝas ĝia kreskiĝo. Se ni, judoj, ne provas kompreni la araban nacion, kiel ni povas atendi, ke la Araboj komprenu nin?

En la cionista movado kaj la juda loĝantaro de ĉi tiu lando - kaj estas same por la araba mondo - ĉiam estis kelkaj personoj kaj iuj grupoj, kiuj klare komprenis tiun problemon kaj volis konsekvence agi. Bedaŭrinde, ili ne havis la regpovon.

Male, kiuj ĝin havis, tiuj montris tre limigitan komprenemon de la vera problemo. Mankis al ili la kredo kaj internaj motivoj, nepre necesaj en ĉiu lukto.

Antaŭ nelonge, la israela ministro por Eksterlandaj Aferoj, S-ro Abba Eban, parolis pri "komenco de degelo en la araba menso". Li ne demandis al si, ĉu la penso de la regantoj en Israelo ne devus same degeli. Kial io ne komencos movi ĉe ni antaŭe ?

La celo de tiu seminario estas skui la spiritojn, ŝanceli nian memkontenton, mobilizi la bonvolontulojn, kiuj opinias necese lukti por ne tro fora paco. Ni havu la kuraĝon meti la fingron sur tion, kio ne glate iras ĉe ni, kaj provu ĝin rebonigi.

Ni apelaciu al la israela opinio por evoluigi ĝian sintenon antaŭ la Araboj ĉe ni kaj ĉirkaŭ ni. Ni senlace kondamnu la politikon sekvitan de dek-ok jaroj, kiu neniam proksimigis nin al la kompreno, nek al la paco, kaj do ne povas tiurilate sukcesi dum la venontaj jaroj.

Ekde la fondo de la israela ŝtato, oni faris sur la kampo de la jud-arabaj rilatoj tion, kion oni devus esti neniam farinta, kaj la necesaĵo, la nepraĵo neniam estis faritaj. Ni luktu hodiaŭ por inversigi la fluon. Se tiu seminario sukcesos mobilizi la fortojn por vera lukto favore al paco, ĝi estos praviginta ĝian eston kaj ni povos esperi eĥon je la alia flanko de la barikado.

GIVAT HAVIVA, Septembro 1966.

# La arabaj rifuĝintoj

## Fundamenta problemo por Israelo

La maniero ektrakti la problemon de la arabaj rifuĝintoj tuj ebligas juĝi, ĉu oni vere serĉas ĝin solvi aŭ ĉu oni neniel intencas fari tion.

Iuj sin demandas, ekzemple, ĉu ne estus necese ankaŭ permesi al la Germanoj reiri en la lokon el kiu ili estis forpelitaj post la dua mondmilito. Kvazaŭ oni povus kompari la arabajn rifuĝintojn kun la germanaj rifuĝintoj!

Ĉu la palestinaj Araboj responsas pri la situacio tie kreita same, kiel la Germanoj en Eŭropo? Ben Gourion konfesis, dum la milito de 1948-49, ke la palestinaj Araboj ne volis tiun militon kaj cetere ne partoprenis ĝin...

Cetere, ni estas nacio de rifuĝintoj, kiuj devas konsideri specifan politikan situacion. Aliaj nacioj eble povas konstrui sian estonton sur la forto. Ni ne povas tion, ĉar en la realo, ni edifas sur la malforto de aliaj popoloj.

Dum kiom da tempo ni povos tion fari? Mi ne ŝatus vivi la tagon, kiam tiuj popoloj diros al ni: "Halt'! Ne daŭrigu!" . Por ke tiu tago neniam alvenu, ni devas ĉion dediĉi por solvi la problemon de la arabaj rifuĝintoj, eĉ se ĝi postulas niaflanke gravajn oferojn.

Kion tio signifas? Mi konsentas kun tiuj el miaj amikoj, kiuj ĉi tie diris, ke estas necese diferencigi inter la du aspektoj de la problemo: unuflanke, la oficiala agnosko de la rajto, por la arabaj rifuĝintoj,

elekti inter reiro en Israelon kaj materiala kompenso, aliflanke, la realigo de tiu rajto.

La oficiala akcepto de iu rajto kaj ĝia realigo estas fakte du malsamaj aferoj. Kaj estas tute sendube pro la fakto, ke ni ne faris la unuan paŝon - tiun de la oficiala agnosko - ke ni ĉiam ne scias, kiom estas da rifuĝintoj, kiom dezirus reveni, kiom ni povus enlasi, laŭ la sekureca vidpunkto, laŭ la ekonomia vidpunkto, ktp. Tiel longe, kiel ni ne faras tiun paŝon, la demando daŭre stariĝas. Kaj tio havas duoblan konsekvencon: unue, tiun problemon uzas la arabaj landoj kiel propagandan armilon kontraŭ Israelo; due, ĝi pliakriĝas laŭ la jaroj,ĉar la nombro de rifuĝintoj kaj ilia posteularo plimultiĝas. Nuntempe estas almenaŭ 75% pli da arabaj rifuĝintoj, ol antaŭ dek-kvin jaroj. Kaj, kiuj imagas al si, ke la problemo memmalaperos pro la morto de la malnova generacio kaj pro la forgeso de la nova, tiuj tutcerte elreviĝis. Sperto konfirmas tion, ĉar kiam oni demandas al infano de rifuĝinto naskiĝinta en Bejruto de kie li venas, li respondas: "De Ramleh".

Per la mono elspezita por provizi la vivtenojn de la rifuĝintoj kaj tiu, kiun oni elspezas jare por armiloj, same en Israelo, kiel en la arabaj landoj, oni estus povinta solvi kelkoble la problemon de la arabaj rifuĝintoj, kiu restadas kompleta.

Do la demando ne estas: kie trovi tiujn astronomiajn sumojn por solvi tiun problemon? Ĉiel, ni elspezas ilin. Ĝi ne estas pli : kiel Israelo povus akcepti tiom da rifuĝintoj? Hussein Faris estis prava,dirante ĉi tie, ke se ni kredas - kaj mi estas konvinkita pri tio - ke milionoj da Judoj ankoraŭ venos en Israelon, tiam oni ne povas honeste dubi, ke Israelo kapablas akcepti ian nombron da arabaj rifuĝintoj.

Kiom da Araboj, vi opinias, revenus, se ili povus libere elekti? Abdul Nasser konjektis, ke ili estus malmultaj elekti la reiron, ĉar, kio interesas ilin antaŭ ĉio, tio estas la moralaj kaj politikaj aspektoj de la problemo. Praktike, la arabaj rifuĝintoj preferus kompensojn por enlokiĝi alie, ĉar Israelo estas malgraŭ ĉio pli juda ŝtato, ol araba ŝtato, aldonis Nasser.

Ni starigu konkrete la problemon: se la arabaj rifuĝintoj iam amase enirus la landon, ili farus tion nur en

la kadro de entuta solvo de la israel-araba konflikto. En foresto de tia entuta solvo, ne okazus reiro de la rifuĝintoj. En la aktuala situacio, oni povas apenaŭ paroli pri bonvolema gesto flanke de Israelo laŭ formo de kuniĝo de la familioj; estas evidente, ke temas nur pri kelkaj miloj, maksimume de kelkaj dekmiloj da rifuĝintoj.

Sed, se ni alvenus al pacostato, kial Israelo ne povus akcepti proksimume 200 000 aŭ eĉ 300 000 rifuĝintojn? Kie estus la malhelpo de ensorbigo laŭ la ekonomia vidpunkto?

Laŭ la sekureca vidpunkto, du aferoj estas rememorendaj. Se la paco regas, akcepti nombron pli malpli grandan de rifuĝintoj ne povos krei apartajn malfacilaĵojn. Kaj se la paco ne alvenos, eĉ nuntempe la araba komunumo en Israelo, el proksimume 400 000 personoj, prezentas kompleksan politikan problemon. Estas tiuj ambaŭ aspektoj de la sama problemo, kiujn oni ne devas forgesi.

Mi estas konvinkita, ke se ni ektraktus tiun problemon sammaniere, kiel tiujn de la konstruado de nia lando, ni komprenus, ke ĝia solvo estas necesa parto de tiu konstruado, same kiel estus estinta neeble konstrui tiun landon sen sekigi la marĉojn, prepari la homojn, krei agrikulturajn koloniojn, sen disvolvi nian kulturon kaj nian ekonomion.

Same, estus neeble daŭrigi tiun konstruadon, post longa tempo, sen solvi tiun problemon de la rifuĝintoj. Se ni estus ektraktintaj tiun problemon tiamaniere, mi estas konvinkita, ke ni estus trovintaj la forton kaj la rimedojn progresi, eĉ nur per unu paŝo, en la bona direkto.

La seneliro kuŝas en la fakto, ke la arabaj regantoj diras "akceptu la rifuĝintojn" dum Israelo persiste asertas "neniu ". Estas klare, ke, kiam oni diras "ĉiuj rifuĝintoj", oni ne serĉas sincere solvon. Unue, ĉar ne ĉiuj revenos. Grava parto - proksimume la duono - ne plu estas en la tendaroj kaj enlokiĝis en la arabaj landoj. La vera demando estas: ĉu estas utile por ni, ke la loĝantaro de la tendaroj daŭre ŝimu kaj degeneru, aŭ ĉu ni volas kontribui al ilia readaptiĝo al normala

vivo. Ĉu ni estas pretaj ilin helpi, aŭ ĉu utilas al ni, ke ili restu en la tendaroj kaj servu kiel dinamito en la israel-arabaj rilatoj?

Se ni ellaborus planon por la rifuĝintoj, la arabaj regantoj estus provitaj. Krome, la ekzistado mem de tiu plano ŝanĝus la rifuĝintojn - centmilojn da rifuĝintoj - en eventualajn aliancanojn. Ili povus diri al la arabaj regantoj: "Rigardu, la Judoj estas pretaj ion fari. Kial vi malhelpas la fakton, ke nia mizero finiĝu? Kial vi ne helpas nin?"

Mi ne volas pritrakti tro da praktikaj detaloj. Iu komisiono de U.N. jam kalkulis, kiom Israelo devus elspezi por kompensi la perdon de la arabaj bienoj. La cifero najbaras 680 milionojn da dolaroj. Grava sumo estis voĉdonita de U.N. por kontribui al readaptiĝo de la rifuĝintoj. Tiu sumo neniam estis uzita, ĉar neniam oni alvenis ĝis tiu stadio de la operacio. Forpasinta Dag Hammarskjoeld ellaboris programon antaŭvidantan dediĉi parton de la petrola rento kolektita de la arabaj landoj al fonduso por readaptigo de la arabaj rifuĝintoj.
Tiu problemo certe ne estas facile solvebla. Tuj kiam ni ekagos, ni ekkonscios, ke ni havis nenian ideon pri la malhelpoj. Same kiel por la kolektigo de la Ekzilitoj, neatenditaj malfacilaĵoj ekaperos, kiam la arabaj rifuĝintoj komencos eniri. Sed mi demandas al vi, kiel koncepti politikan solvon al la israel-araba konflikto, ne estingante la fajron, kiu brulas en ĝia centro kaj en kiu ĝi sin provizas?
Eĉ se ni povus ignori nian prirespondecan parton, ni devus esti la ĉefaj interesitoj por solvi tiun doloriĝan problemon. La arabaj landoj, kiuj loĝigas la rifuĝintojn, ne povas; bedaŭrinde, konservi sendifekta la nunan situacion kaj eĉ ĝin uzi en sia lukto kontraŭ Israelo.

Kompreneble, se ni konsideras la problemon de la arabaj rifuĝintoj kiel malfacilaĵojn inter aliaj, ni povas daŭrigi kiel dum la estinteco. Ni ja havas problemojn nesolvitajn, inter kiuj, tiun ĉi. Sed se ni konsideras la demandon pri paco, pri niaj rilatoj kun la Araboj, kiel ĉefe grava, tiam necesas al ni volo [illegible] ektrakti tiun problemon, kiel ni ektraktis multe da aliaj en tiu lando.

GIVAT HAVIVA, Septembro 1966.

# La paco ne povas esti trudata

Ĝi naskiĝos nur el reciproka komprenemo

Araboj kaj Judoj daŭre pagas multekoste sian provon, dudekjaraĝa, tranĉi per glavo la implikan nodon de siaj rilatoj anstataŭ eklabori kune, por ĝin malnodi pacience per daŭra toleremo. Tiu vundo, kiu daŭre sangas, plue falsas kaj malhelpas liberan disvolvadon de niaj ambaŭ popoloj, kaj subfosas la internaciajn rilatojn.

La Sestaga Milito en junio 1967 forigis la danĝeron, kiu minacas la israelan ŝtaton. La sento de kreskinta sekureco, almenaŭ en la tuja estonto, estigis viglan senpeziĝon. Neniu parto de Israelo troviĝas nuntempe en la trafpovo de la malamikaj kanonoj.

La araba mondo, venkita sur la batalkampo, estas embarasita kaj konfuzita. En Israelo, nova generacio ankoraŭ spertis la abomenon de la milito kaj vidis la morton antaŭ si. Sed eĉ post tiu mirinda venko, Israelo tute ne konas kvietecon. La fundamenta problemo de la rilatoj inter Israelo kaj la araba mondo staras tuta, en sia streĉiteco. La demandoj, el kiuj fontis la kontesto ne estis solvitaj kaj eĉ iuj, kiel la nombro de arabaj rifuĝintoj, fakte pligraviĝis.

Post plurjara svingado de la slogano "eĉ ne ununura rajtos reveni", la israela registaro subite troviĝas fronte al situacio, en kiu al la 300 000 Araboj de Israelo aldoniĝis 1 250 000 Araboj - lokaj indiĝenoj kaj rifuĝintoj - kiuj loĝas en la okupitaj teritorioj. La milito estas finita, sed ne mankas la problemoj, malnovaj kaj novaj, deveninta el la venko.

Krome, la Araboj pagis, multekoste, sian ignoradon de iuj elementoj fundamentaj por Israelo.

La israela ŝtato estas la patrujo de la juda popolo, kiu, en ununura generacio suferis senprecedencan bruloferon en la historio. La ekstermado de ses milionoj da Judoj - unu triono de la iama popolo - estas komparebla kun la mortigo de almenaŭ tridek milionoj da Araboj.

Centmiloj da Israelanoj, el kiuj grava nombro surportas, sur la brako, tatuitan numeron, kiu estis ilia en la koncentrejoj, estas ankoraŭ obsedataj pro la rememoro de

tiuj naziaj kruelegaĵoj.

Post generacioj da premo kaj persekutadoj en la Diasporo, tiu popolo, kiu povas denove ĝui, en sia retrovita patrujo, la mirindan guston de la libero, de la digno, same individua, kiel nacia, ne plu konsentos trasuferi buĉadon. Ĝi eklevos sin unuanime por defendi sian vivon, sian liberon, sian estonton, disvolvante povorimedojn kaj energiojn, kiujn ĝiaj malamikoj ne suspektas.

La juda popolo, kiu vivas en la Diasporo, akiris novan dignon kun la naskiĝo de la israela ŝtato. Ankaŭ ĝi ne restos inerta se la hebrea ŝtato estos minacata. Finfine, kiu ajn estu la loko okupita de Israelo sur la internacia scenejo, ĉiam ekzistos fortoj en la ne-juda mondo, kiuj, pro sincere humanistaj kialoj aŭ pro motivoj de politika oportuneco, defendos la vidpunkton de Israelo.

Estas neeble detrui la israelan ŝtaton sen ekstermi ĝiajn defendantojn ĝis la lasta. La Araboj povas perdi unu, du, aŭ tri militojn, kaj tamen daŭrigi la militagojn. Israelo ne povas perdi, eĉ unu fojon. Ĉar unu-nura malvenko ekvivalentus ĝian totalan detruon.

Tial, ĉiufoje kiam Israelo estas minacata, ĉiu el ĝiaj civitanoj, malnova kaj nova enmigrinto, okcident- aŭ orient-devena, religiema kaj laikema, kiuj ajn estu ĝiaj politikaj opinioj, ĝia sekso aŭ ĝia aĝo, provas ĉion eblan por defendi sian landon, konsciante, ke,kio estas riskata, tio estas ne nur la estonto de la nacio, sed ĝia ekzistado mem, fine: ĝia vivo.

Ignorante tion, la arabaj regantoj faris sian unuan gravan eraron. Kaj ne per ŝanĝado de la sloganoj aŭ taktikoj ili sukcesos ĝin korekti.

La dua eraro de la arabaj regantoj estis troe taksi la israelan paciencon antaŭ la provokaj agoj. En la internaciaj rilatoj tutsame, kiel en la rilatoj inter individuoj, la pacienco ne estas senlima.

Neniu suverena ŝtato estus tolerinta senfine la sabotagojn kaj murdojn faritajn de speciale trejnitaj sturmtaĉmentoj, kiuj poste bombastis pro siaj krimoj , ofte trograviganta ilin.

La arabaj respondeculoj malpravis konjekti, ke Israelo ne reagos, kiam la Jordania armeo estis subigita al

la egipta estreco (post milit-konsento siria-egipta); kiam la egiptaj trupoj amasiĝis ĉe la israela limo; kiam la markoloj de Tiran estis blokitaj, malpermesante la transiron de la israelaj ŝipoj al Azio kaj Afriko. Ankoraŭ pli grava: la Araboj proklamis senkaŝe, ke ili ne per tio limigus siajn agojn. Ili diris, ke post restarigo de la situacio antaŭa al 1956, ili daŭrigus - por reestigi la situacion de antaŭ 1948. Kiuj fondis sian politikon sur la hipotezo, ke al Israelo oni povos trudi la toleron de ĉiu provoko sen reagi kaj sen uzi armilojn por defendi sian ekziston kaj estonton, tiuj ludis kun la fajro. La rezulto de tiu ludo estis grava kaj detrua konflikto, trudanta ja meritan punon al kiuj respondecis pri ĝi.

La tria grava eraro de la arabaj regantoj estis subtakso de la luktokapabloj de la Israelanoj, juĝo de la batalemo de Israelo laŭ la nombro de ĝiaj enloĝantoj. Malnova popolo, kies historio estas unika en la mondo, Israelo kunigas realigojn de la kulturo kaj de la teknologio el la tuta mondo. La pionira spirito - esenca por la renaskiĝo kaj rekonstruado de iu lando - estis tie ekzaltita dum generacioj. La defendfortoj de Israelo, la nura vera garantio pri sekureco de la popolo en sia retrovita patrio, estas produkto de zorga preparado.

La eventoj pruvis, ke abundo de armiloj ne estas ĉio. La uzado de modernaj armiloj kaj ankoraŭ plie la loĝistiko, kiun postulas moderna armeo, estas ligitaj kun alta teknologia nivelo kiu, laŭvice, estas rezulto de racia vivnivelo kaj de kutimoj de la soldatoj en la civila vivo.

Kio estas ankoraŭ pli decidiga, ol la teknologia disvolviĝo, tio estas la socia kaj politika reĝimo de la lando, la identigo de la individuo kun la socio, en kiu li vivas. Se li estis edukita al personaj respondecoj, preparita efektivigi planitan agadon aŭ improvizi se necesas, se li estas kapabla labori taĉmente, montri sindonemon - ĉio tio estas elprovita sur la batalkampo.

La tuta ebla propagando ne povas plenigi la abismon inter oficiroj kaj soldatoj tie, kie tiu abismo ekzistas. Se la oficiro ne estas la unua sturmi la malamikojn - kaj tia li estas en Israelo - sed la unua forlasi la batalon, tiam la tuta trupunuo diseriĝas post lia

malapero.

-Sperto montris, ke la Araboj estas nekapablaj detrui la israelan ŝtaton. Tamen, grava disiĝo persistas inter la konscio de tiu nekapableco kaj la volo de la Araboj rekoni, ke Israelo estas tie tute definitive kaj ja apartenas al tiu regiono.

Tiu sama sperto montras aliflanke, ke, kiu ajn estu ĝia militpotenco, Israelo ne povas trudi pacon al la arabaj landoj per la forto de la armiloj. Per la vorto paco mi ne volas diri formalan dokumenton, truditan de iu diktaĵo, sed veran pacon fonditan sur sincera deziro meti finon al ruiniga estinteco kaj inaŭguri novan eraon el bonvolemo, reciproka komprenemo kaj libera kunlaboro en la intereso de ĉiuj.

Ĉar ili ignoris tiujn esencajn elementojn de la israela fakto, la Araboj perdis militkampanjon. Ĉu la Israelanoj nun ne estas perdontaj la politikajn fruktojn de senprecedenca militvenko pro la fakto, ke ili persistas ignori la esencajn elementojn de la araba fakto? Ĉu la Israelanoj ne perdos la batalon por la paco tiel arde dezirata?

La jena komprenmaniero estas ĝenerala diskonata en Israelo: ĉar la Araboj, kiuj intencis nin malaperigi, estis venkitaj sur la batalkampo, ili ne havas eblon elekti alion, ol sidiĝi kun ni por trakti pacon. Erare. Ĉar spite siajn perdojn de homoj, ekipaĵoj, teritorioj kaj prestiĝo, la Araboj ne estis frakasitaj. La ĉefaj riĉofontoj de la arabaj landoj estis apenaŭ difektitaj. La perdoj de militekipaĵoj povas esti anstataŭigataj. La nombra raporto de la fortoj inter la araba kaj israela loĝantaro - proksimume de kvardek kontraŭ unu - ne decide ŝanĝiĝos en antaŭvidebla estonto. La ŝanĝoj, kiuj okazas en la arabaj landoj kaj rezultas el entuta historia procezo, grade reduktos la kvalitan diferencon inter la du partioj.

La politikajn dividojn de la araba mondo, ŝuldatajn al la diversaj reĝimoj kaj iliaj internaj kontraŭdiroj, oni ne devus konsideri kiel neŝanĝeblan faktoron. Eĉ en la nunaj cirkonstancoj, la Araboj disponas plurajn gravajn atutojn: ilia internacia graveco valoras almenaŭ kvaroble pli, ol ilia nombra forto. La dek-tri ŝtatoj sumiĝas je 12% el la nacioj de UNO, kvankam ili konsistas nur el 3% de la mond-loĝantaro; iliaj vastegaj

teritorioj (11,5 milionoj da kvadrataj kilometroj,t.e. 1 miliono pli ol Eŭropo) donas al ili grandan strategian gravecon por la internaciaj interkomunikiĝoj surtere, mare kaj aere; ilia supermezura ekonomia potenco, ankoraŭ ne ekspluatita, sed precipe iliaj petrolaj riĉofontoj konsistigas pli ol 60% de la entutaj provizoj de la kapitalisma mondo, escepte de Iranio.

Malgraŭ ilia konfuzo, la Araboj ne havas la senton, ke ili definitive perdis la batalon kontraŭ Israelo. Ili estas konvinkitaj, ke, kio ajn okazu, ili povas daŭrigi la militon.

Neglektante tiujn fundamentajn elementojn, oni riskas gravajn erarojn pri juĝo de la araba mondo, ne malpli seriozajn, ol la arabajn pritaksadojn pri Israelo, kiuj, same, ignoras la esencajn elementojn de la israela fakto.

Fakte, post la juniaj bataloj, ambaŭ partioj daŭre frontas al la sama malnova dilemo: aŭ plue elteni konstantan militstaton, aktivan aŭ latentan, aŭ esplori vojon, kiu povus konduki al politika "modus vivendi",kiu nura povas certigi pacon kaj sekurecon.

Tiu lasta elekto liberigus la riĉofontojn malŝparitajn dum tiom da jaroj en la konkuro de armado, en la diplomataj militoj, malvarmaj aŭ varmaj. Tiam ili povus utili por la ekonomia kaj socia disvolvado de la regiono.

Ne estas dubinde, ke la forto kaj potencéblo de Israelo konsiderinde kreskis post ĝia milita venko. Sed ĉiu militagado, eĉ triumfa, valoras laŭmezure kiel ĝi progresigas la politikajn celojn por kiuj ĝi estis komencita. Ni ne preteratentu, ke la unua celo de Israelo - ekster ĝia timzorgo sekurigi la kunigitajn ekzilitojn - estis kaj estadas la paco, la reciproka komprenemo kun la araba mondo kaj la organa integriĝo de la juda ŝtato en tiu regiono de la mondo.

Israelo militiris en junio 1967, publike proklamante ke ĝiaj celoj estas la paco kaj la sekureco kaj ne la konkero de teritorioj. Ke la venko akrigis la deziron pligrandigi la teritorion, nenio estas pli natura. Iuj asertas, ke "neniu colo de la liberigitaj teritorioj" estu redonita (Menahem Begin, gvidanto de "Herouth"); aliaj parolas pri "unika ŝanco remodli niajn limojn" (Moshe Dayan, ministro pri defendo), kaj fine, iuj kon-

tentigus sin per "minimumaj rektigoj de la limoj, necesaj por certigi sekurecon al Israelo". Je mia vidpunkto, ne estas dubinde, ke aneksema politiko metas antaŭvideblan finon al la espero, ke la milito de junio 1967 estu la lasta el la israel-arabaj militoj.

Estas fakte bedaŭrinde, ke nek la ĉefministro, nek la ministro pri eksterlandaj aferoj ripetis ekde julio la deklarojn, kiujn ili faris dum la milito furiozis, en junio, nome, ke Israelo havas neniun ekspansian teritorian celon. Nenio estas dirita pri la intencoj de la israela registaro eliri el la okupitaj teritorioj post solvo de la pac- kaj sekurec-problemoj. Estas verdire pli malfacile gajni pacon ol gajni militon, ĉar la vera problemo ne plu estas venki, sed persvadi. Vera kaj daŭra paco estas ebla nur se ĝi estas fondita sur leĝa kaj natura justeco. En la internaciaj rilatoj, same kiel inter individuoj, la preskribo de Hillel daŭre validas: "Kio al vi estas malagrabla, tion ne faru al alia homo".

Ne estos paco sen reciproka komprenemo. Nu, depost nia reiro en Palestinon, je la fino de la lasta jarcento, grava demando daŭre atendas respondon: kiel la Araboj povus kompreni la Judojn, se la Judoj ne komprenas la Arabojn? La eraroj faritaj de la israela politiko kontraŭ la Araboj havas radikojn en la nekomprenemo de la fundamentaj aspiroj kaj interesoj de la landoj najbaraj al Israelo. Tiu nekomprenemo manifestiĝas per la teorio ŝatata de la plimulto de la israelaj "spertuloj" pri la araba problemo, tio estas, ke "la Araboj komprenas nur la perforton". Sendube, kiel ĉiuj, ili respektas forton, sed estas evidente, ke neniu forto-manifestiĝo povas veki sinceran estimon.

La esenca celo de la konservado de Israelo forta en ĝiaj rilatoj kun la araba mondo estas garantii la travivon de tiu nova ŝtato ĝis ĝiaj najbaroj estos alkutimiĝintaj al ĝia ekzisto kaj estos rezignintaj ĝin detrui. Sed samtempe, esence estas, ke Israelo, kiel nova kaj vigla elemento de la regiono, estu kapabla pruvi per siaj agoj, ke ĝi ne intencas kaŭzi malbonon al la Araboj, ke ĝi respektas kaj konsideras ilin kiel egalulojn. Israelo devas montri komprenemon por iliaj aspiroj kaj ambicioj, esti preta ilin apogi tiamaniere, ke la arabaj popoloj konsideru la judan ŝtaton kiel valoran aliancanon en sia lukto por la liberigo kaj la progreso de la tuta regiono.

Paço inter Israelo kaj ĝiaj najbaroj dependos grandparte de la bildo, kiun faros al si la Araboj pri la Israelanoj. Niaj agoj kaj forgesoj, ankaŭ deklaroj similaj al "ni estas eŭropa lando malgraŭ nia geografia situacio" kondukas la Arabojn identigi Israelon kun la fremdaj potencoj kaj influoj, el kiuj ili volas liberiĝi. La alia aspekto de Israelo, kiu vekas malfidon de la Araboj, estas ĝia teritoria ambicio. Ĉiu israela agado, kiu pligrandigas tiun araban malfidon, malfortigas la pacajn perspektivojn.

La atesto de ĉiu solvo al la problemo de la rilatoj inter ambaŭ popoloj konsistas scii, ĉu tiu solvo respondas al du esencaj kriterioj inter si ligitaj:

- la agnosko de la homaj kaj naciaj rajtoj de la palestinaj Araboj, ĉu temas pri israelaj civitanoj aŭ rifuĝintoj;
- la agnosko de Israelo kaj de ĝia integriĝo en tiu araba regiono.

La intereso de ambaŭ popoloj konsilas malhelpi la fremdajn potencojn eltiri profiton el la israel-araba konflikto por siaj egoismaj celoj je la malprofito de la nacioj rekte koncernataj.

La israela ŝtato, subtenata de la juda popolo, devas helpi la palestinajn Arabojn realigi siajn sociajn sopirojn: fondi ŝtaton por si tie, kie estis la malnova Palestino, escepte la israelan teritorion, t.e. en Cisjordanio kaj en la zono ĉirkaŭ Gaza, kie vivas la plimulto de la palestinaj Araboj. Araba ŝtato tia estus federe ligita al israela ŝtato, surbaze de ekonomia kaj kultura kunlaborado kaj de reciprokaj kaj internaciaj garantioj; ĉi-lastaj certigus pacon kaj sekurecon al ĉiuj kaj evitus, ke unu el la du partioj estu utiligata kontraŭ la alia pro fremdaj interesoj.

Tiu federacio restus malfermita al Jordanio (kies duono de la loĝantaro estas palestina) per aliĝo kiel aparta ento, aŭ per kunfandiĝo kun la palestina ŝtato instalita en Cisjordanio kaj Gaza.

Kun la helpo de iu internacia organismo, la palestinaj rifuĝintoj estus readaptitaj, socie kaj ekonomie, parte en la araba ŝtato membro de la federacio. Tamen, parto de tiuj rifuĝintoj estus ensorbita de la israela ŝtato (precipe en la kadro de la kuniĝo de la familioj)

kaj de la najbaraj ŝtatoj arabaj, kun helpo de la financaj kompensoj kaj helpoj konsentitaj de la internaciaj fondusoj.

Post forigo de tiuj radikoj de la jud-araba konflikto, nenio plu kontraŭstaros pacan finaranĝon inter la israel-araba Federacio kaj Libanio, Egiptio kaj Sirio, post la retiriĝo de la israelaj fortoj el la teritorioj okupitaj dum la milito de junio 1967.

La paca kontrakto certigos liberecon de israela navigado en la Eilath-golfo kaj en la Suez-kanalo, same kiel la transiton de ĝiaj nord- kaj sud-arabaj najbaroj tra la israela teritorio. Poste, la vojo estos malfermita por formiĝo de politika kadro komuna (Konfederacio) entenanta ĉiujn popolojn de tiu regiono, bazita sur la nacia kaj politika suvereneco, sur la respekto de ĉiuj etnaj kaj religiaj entoj, la kunlaborado kaj la pozitiva neŭtralismo en la internaciaj rilatoj.

Kiam la paco kaj la kunlaborado anstataŭos la malamikecon kaj la malamon, oni povos meti finon al la konkuro de armado kaj certigi nuklean senarmigon de tiu regiono, kiu ĉesos esti tereno de alfrontado por la grandaj potencoj.

La nacioj ne lernas el la libroj sed el la faktoj. Sperto montras, ke estas esenca por ambaŭ popoloj, israela kaj araba, ektuŝi la komplikan nodon de siaj rilatoj kun saĝo, sed ne svingante glavon.

Historio abundas je ekzemploj, en kiuj popoloj, kiuj interbatalis dum generacioj, sukcesis tamen interpaciĝi kaj establi, konklude, normalajn kaj amikecajn rilatojn. Neniu solvo, trudita de kiu ajn maniero, estos profitodona al la Israelanoj kaj al la Araboj, same kiel estus paco akirita per iliaj propraj klopodoj, dank'al la komuna esplorado de justa kaj honoriga solvo de iliaj malakordoj.

"JEWISH QUARTERLY", Londono,
Novembro 1967.

# La alternativo

Kiel antaŭe, estas nuntempe klare, ke se paca kontrakto ne solvas la israel-araban malkonsenton, nova milito ne povos esti evitita. La teorio, laŭ kiu ni ne kalkulu pri tio "ĉar nova milito ne interesas nin kaj la

Araboj ne kapablas ĝin fari" ne valoras, se ni antaŭvidas trans la tuja estonto. Ĉiuokaze, tiu sinteno naive optimisma ignoras la tutan kunteksto de la nuna milito kaj ĝian influon sur la evoluo de la konflikto.

Ni prefere konvinkiĝu, ke nova milito estos pli peniga kaj postulos pli da foroferoj kaj suferoj ol la antaŭa. La fundamentaj problemoj, kiuj venenas la rilatojn inter Israelo kaj la arabaj landoj restados, en la plej bona kazo, neŝanĝitaj post ĉiu milito. Iuj pligraviĝos, novaj problemoj subite estiĝos, kiuj komplikos plie la doloriĝajn kaj malfacilajn rilatojn inter ambaŭ popoloj.

Pli ol iam, ni frontas al la fundamenta demando, kiu stariĝis, kiam la milito de junio 1967 finiĝis: ĉu la celo, por kiu tiom da valora sango estis verŝita dum kaj post la Sestaga Milito, estas meti finon al la sangobano, aŭ ĉu temas nur pri alia ĉapitro de senfina hemoragio?

Kiam ni aŭdas la demandon starigitan de tiom da Israelanoj: "Kiel tio finiĝos?", ni neniel trovas konsolon en la biblia sentenco, kiun Dayan citas: "Estu sen timo, Jakobo, mia servanto". "Jakobo" ne plu estas timema kaj ĉiutage pruvas tion de pluraj jardekoj. Sed, en la nuna situacio, la lukto por la paco postulas pli da kuraĝo kaj braveco, ol la rezignacio al la milito. Nenio estas pli facila ol mallaŭdi la aliajn pro la nuntempa senelirejo. Verdire, ne estas la "araba rifuzo", kiu kaŭzis la aktualan senelirejon, sed ĝuste la manko de unuflanka deklaro far la israela registaro, akceptanta sen dubeenco en ĝia tuto la rezolucion de la Sekurec-Konsilantaro (kiel faris Egiptio kaj Jordanio), kiu blokadis ĉiun progreson.

Oni ne povas nei, ke depost 1967, la registaro de Israelo estas nekapabla respondi sen duba senco la demandon: "Kion vere volas Israelo?"

Ĉiuj scias, ke la plimulto de la israela popolo preferus la finon de la milito kaj pacan finaranĝon, sed la ĉefaj postenoj en la israela registaro estas en la manoj de iu malplimulto, kiu preferas teritoriojn ol pacon, kaj en la ĉiutaga praktiko, estas tiu minoritato, kiu difinas la politikon de la registaro, ĝin malhelpas iniciati favore al paco kaj insistas por ke estu kreitaj "neripareblaj faktoj" en la okupitaj teritorioj, en rekta kontraŭdiro kun la strebado al paco.

Grave estas decide deklari: la daŭrigo de la milito, kun

ĉio, kion ĝi implicas, ne plu estas nepra nek neevitebla. La signalvorto: "Ni ne havas la eblon elekti" jam de longe estas falsa signalvorto. Ekzistas alternativo!

Temas scii, ĉu ni havas sufiĉe da volo, da obstineco, sufiĉe da politika kuraĝo, por kapti tiun alternativon.

"AL HAMISHMAR", Printempo 1970.

En la broŝura serio de L.J.P :

| | |
|---|---|
| Tri prelegoj pri "Gandhi kaj satjagraho | FF 1,00 |
| La Tabuo (novelaro de J. Nesvadba) | .. 1,00 |
| Initiation à l'Espéranto (An Kaŭ) | .. 1,00 |
| La laborista esperantismo (E.Lanti) | .. 1,00 |
| Alveno de abundo kaj konsumsocio(P.V.Berthier) | .. 0,60 |
| En anarkista socio... (J.Grav) | .. 0,30 |
| La rentumo, kiun ni pagas (W.Schmid) | .. 0,30 |
| Ĉu neperforta revolucio... (T. Ebert) | .. 1,00 |
| Vivi en komunumo (M. Schneller) | .. 0,60 |
| Manlibro de nova homo (Rufegon) | .. 1,00 |
| La granda liberiĝo de l'homoj...(J.Duboin) | .. 1,00 |
| Espéranto en 24 pages (por franclingvanoj) | .. 0,60 |
| Pri edukado (el "Vortoj" de E. Lanti) | .. 1,20 |
| Eduko kaj vivsignifo + Rimarki (J.Krishnamurti) | .. 1,50 |
| Memvola servuto (La Boesi) | .. 1,20 |
| Du rêve à la réalité (H.Masson) | .. 1,50 |
| El leteroj de E. Lanti | .. 1,20 |
| Por la paco, kontraŭ la milito(citaĵoj de famuloj) | 1,20 |
| Prognozio (novelaro el la pola) | .. 1,20 |
| Esperanto en 24 páginas (por hispanlingvanoj) | .. 0,60 |
| Nekombitaj pensoj (S.J.Lec) | .. 1,00 |
| Rido sanigas! (poemaro de Josef Burger) | .. 1,20 |
| La liberecana penso (citaĵoj el liberecanoj) | .. 1,00 |
| Anarkio kaj organizo (E. Malatesta) | .. 1,00 |
| Absolutismo (prelego de E. Lanti) | .. 1,00 |
| Ne mortigu! (Leo Tolstoj) | .. 0,30 |
| Humanitaristaj principoj (E. Relgis) | .. 1,20 |
| La rajto de pigro (Paŭlo Lafargue) | .. 1,50 |
| La parabolo pri la cisterno (E. Bellamy) | .. 0,60 |
| Durruti, simbolo de la hispana revolucio (Pario) | .. 1,00 |
| La piramido de l'tiranismo (F.D.Nieuwenhuis) | .. 1,20 |
| Paco en proksima oriento (A. Cohen) | .. 1,20 |
| Civila Malobeemo (H.D.Thoreau) | .. 1,20 |
| Komuna Kantareto de L.J.P. | .. 0,60 |
| Informkajero pri S.A.T, LJP kaj la lab. esp-ismo | .. 0,60 |

La prezoj,en francaj frankoj, entenas la afrankon.
Eblas pagi per respondkuponoj. La mendoj adresi al:
La Juna Penso, F 47340 Laroque Timbaut, Francio
Poŝtkonto: 3374 04 M, Bordeaux

Gérant et imprimeur: Baudé, F 47340 Laroque Timbaut
Commission paritaire de presse 39 863.

## DEMANDARO

Kun celo alporti sian konstrueman kontribuon al Paco , la Jud-Araba Amikeco petas vin respondi jese aŭ nee al la sekvanta demandaro , kaj resumi per kelkaj linioj la kernon de la pripensoj , kiujn ĝi inspiris al vi .

| | JES | NE |
|---|---|---|
| Iº . Ĉu la ne-rekonon , far la Israela Registaro , de la naciaj palestinaj aspiroj pravigas la ne-rekono , far la arabaj landoj , de la ekzistorajto de Israelo ? | | |
| 2º. Ĉu la formigo de provizora Palestina Registaro estus paŝo en la direkto de eventuala traktado ? | | |
| 3º. Ĉu la teritorioj de Cisjordanio kaj de Gaza , kies loĝantoj rifuzas la revenon de la Jordanoj kaj kontraŭstaras la restadon de la Israelanoj , povas servi kiel bazo al kreado de Palestina ento ? | | |
| 4º. Ĉu la unuflanka rekono , far la Israela Registaro , de la rajto de la Palestinanoj al nacia autonomio en tiuj teritorioj estus danĝera por la sekureco de Israelo ? | | |
| 5º. Ĉu la terorismo ĉesus en kazo de politika malfermo flanke de Israelo ? | | |
| 6º. Ĉu Israelanoj kaj Palestinanoj havas komunan intereson akordiĝi sen ekstera entrudiĝo ? | | |
| 7º. Se jes , ĉu la ĉi-sekvaj kondiĉoj estas nepre necesaj ? | | |
| a/ Nova Israela Registaro ? | | |
| b/ Politika gvidantaro palestina elektita per universala voĉdonado ? | | |
| 8º. Se ne , ĉu estas nepre necese , ke la palestina afero estu subtenata : | | |
| a/ de ĉiuj arabaj landoj kune ? | | |
| b/ de U.N. ? | | |
| c/ de unu aŭ pluraj grandaj potencoj ? | | |
| d/ de grava parto de la israela opinio , precipe araba ? | | |
| e/ de senpaŭza teroragado , kiu senkreditigus la Israelan Registaron ? | | |
| 9º. Ĉu la palestina naciismo estas politika fenomeno natura kaj rajta ? | | |
| aŭ artefarita agitado flegata de la arabaj ŝtatoj ? | | |
| I0º. Ĉu la israela naciismo estas pli : | | |
| a/ moderna politika esprimado de la postulado de la juda popolo al Sendependo ? | | |
| b/ la rezultato de la hitlera genocido de 40/45 ? | | |
| c/ angla-usona politiko por konservi kontraŭsovetan pontkapon en Proksima Oriento ? | | |

JES | NE

II°. Ĉu Israelo estas fremda korpo en la araba Proksima Oriento ?

I2°. Ĉu Israelo povas atendi 30 jarojn kaj la jaron 2.000 :

a/ sen ricevi rekonon flanke de siaj najbaroj ?

b/ sen helpi la Palestinanojn realigi sian Nacian Sendependon ?

I3°. Ĉu ekzistas eblo de israel-palestina traktado aparte de la priteritoria malkonsento Israelo-Sirio , Israelo-Egiptio ?

I4°. Ĉu vi estas aprobanto de aparta paco flanke de Israelo :

a/ kun Jordanio ?

b/ kun Libanio ?

c/ kun Egiptio kaj Sirio ?

I5°. Ĉu Israelanoj kaj Palestinanoj povas formi unuiĝintan Respublikon ?

I6°. Se ne , ĉu ili povas formi 2 Respublikojn :

a/ tute sendependaj unu de la alia ?

b/ ekonomie federitaj kun Jerusalemo kiel komuna ĉefurbo ?

I7°. Kiujn pripensojn inspiras al vi tiu demandaro ?

---

NOMO (nedeviga):

ADRESO :

SEKSO : PROFESIO : NACIECO :

-:-:-:-:-:-

Post plenigado , bonvolu sendi la demandaron al :

AMITIE JUDEO-ARABE , B.P. I24-08 , 75008 PARIS